# ESPERANTOSERVO, GOTENBURGO

Oskar Svantesson
Skonertgatan 1
Göteborg Vr. Svedujo
Tfno 031 — 29 03 81
Poŝtĝiro 6 22 52

ELDONANTO DE
"LETERO" kaj
"EDUKADO INTERNACIA"

FILMSERVO DE UEA
INFORMADO
LIBROVENDADO
INSTRUADO

Göteborg V 4 febr. 1963

S-ro Mueller,
Estimata.

Via karto de 1 febr. min iom konfuzis. Vere, mi havas kvanton da leteroj, kiujn mi ne respondis, sed kutime mi provas respondi ĉiujn petojn pri "Edukado". Do, se la neago dependas de mi, mi petas vian pardonon.

Pro poŝtaj kaŭzoj mi povas ekspedi provnumerojn nur samtempe kun ekspedo de la ordinara numero. Pro la "pres"-maniero mi ne rajtas afranki kiel por presaĵoj, krom se mi sendas minimume 20 ekzemplerojn samtempe.

Do, vi devos atendi ĝis kiam aperos la venonta numero. Tiam mi ekspedos al vi kelkajn provnumerojn.

Mi esperas, ke viaj vortoj "mi mem abonas" ne signifas, ke vi jam sendis monon. Monon mi ne ricevis. Pri manieroj sendi monon, vidu la aldonitan informfolion!

Sincere via

Oskar Svantesson

Ĝeneralaj informoj pri Edukado Internacia.

La adreso de Edukado Internacia estas ĉe ĝia administranto: (s-ro) Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Göteborg Vr, Svedujo. La telefona numero estas 031 --- 29 03 81 (la unua estas la urb- aŭ stacinumero, la dua la individua). La numero de la persona poŝtĝira konto de Svantesson: 62252. (Ĉiujn pagojn oni adresu al Svantesson persone, por eviti malfacilaĵojn).

Abonperiodo povas komenciĝi ĉiam ajn, kaj por eviti laboramasiĝon ekzemple ĉe jarŝanĝo estas preferinde, ke diversaj abonantoj abonu je diversaj tempoj. La abonkosto ĝuste nun estas po 0.60 de sveda krono por ĉiu numero.

Bv atenti, ke vi konstante estas informata pri la finiĝo de via abono. Tio okazas laŭ unu el du manieroj. Antaŭ via adreso sur la koverto mi notas aŭ la lastan pagitan numeron, aŭ la ankoraŭ restantan sumon de via abonpago. Bv frue reaboni! Dankon!

Ni akceptas ĉiajn valutojn, kiujn ni povas ŝanĝi en nia banko. Vi nur sendu sumeton, proksimume respondanta al la abonkosto por 10 numeroj. En la plej multaj landoj la bankoj verŝajne vendas t. n. "poŝtkamiojn", kiujn oni sendas per ordinaraj leteroj. Internacia poŝtmandato ankaŭ estas uzebla. UL-stelo valoras 0.35 sv. kr. Poŝta respondkupono valoras 0.50 sv. kr. Kelkaj pagas per sendo de bankbileto en ordinara letero, sed tio ĉiam okazas je la risko de la sendinto. --- Bv ne pagi per librovendejoj aŭ UEA aŭ iaj komercaj entreprenoj. Por tiaj pagoj ni devas altigi la prezon per ĉ. 30%. (Nia prezo ne toleras rabatojn!)

En Britujo oni povas pagi al S-ro W. M. Goodes, 7 Osborne Close, Hornchurch, Essex. --- En Francujo oni povas pagi al S-ino Jeanne Carpentier, 25 rue Armand Lamarque, Bordeaux, Gironde.

Pro interkonsento kun Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj nia Edukado Internacia estas la oficiala organo por tiu Ligo. Tio signifas, ke EI promesis aperigi ĉian oficialan materialon. Cetere ne responsas ILEI pri la enhavo de Edukado, nek estas Edukado per iaj promesoj ligita al ILEI.

Pri la aperado de Edukado mi volas diri, ke mia intenco estas, aperigi ĝin proksimume unufoje en ĉiu monato. Ĝi kompreneble ne estas ia komerca entrepreno. La celo estas, servi al la instruista esperanto-movado. Ni scias, ke multaj dezirus havi ion pli imponan ol cirkulero. Tuj kiam la cirkonstancoj permesos, ni certe donos. Ĝis tiam ni preferas stari sur pli firma tero. Ankaŭ ni ne donas "duoblajn" numerojn, kio foje okazas je "monataj" esperantogazetoj. Se ni malregule aperas, la kosto por la abonanto laŭe iĝas pli malgranda. Tio estu iaspeca konsolo por li!

De ĉiu numero ni pretigas nur la abonitan kvanton. Ni ne povas garantii, ke vi povas ricevi jam aperintajn numerojn. La regula aperado de Edukado estas garantiita tiomgrade, kiom povas tia afero esti garantiita, kiam ĝi dependas de unu sola persono. Ni ne volas pledaĉi, ke oni abonu, ĉar ni pensas, ke la plej multaj instruistoj komprenas, ke io estas pli bona ol nenio. Finfine estas VI, kiu decidas pri la propero aŭ neprospero de Edukado Internacia.

Sincere via
Oskar Svantesson